

Mirinfano - paroliga ekzerco

MI ESTAS DUDEK-JARA

→

KAJ MI PAROLAS ESPERANTON KAJ ...

- LA FRANCAN
- LA ANGLAN
- LA HISPANAN
- LA ITALAN
- LA GERMANAN
- LA RUSAN
- LA SVEDAN
- LA ĈINAN
- LA JAPANAN
- LA PORTUGALAN
- LA GREKAN
- LA TURKAN
- LA TAJAN
- LA NEDERLANDAN
- LA POLAN
- LA ĈEĤAN
- LA ARABAN
- LA FINAN
- LA LINGVON DE LA BIRDOJ (LA “BIRDAN”)

(LINGVONN)

KAJ MIAN PROPRANN GEPATRAN LINGVON,
la (lingvon).

Kiel mi uzas la materialon *Mirinfano*:

Mi normale *ne* disdonas la supre videblan folon (nur por la studenta dosiero post la aktivaĵo).

Mi uzas mian strangan pluŝbeston (kameleonon, sed povus esti kiu ajn besto kun karaktero). Ĝi nomiĝas 'Ĝorĝo'.

Ni kun la grupanoj staras en cirklo kaj mi komencas pridemandante pri la aĝo de Ĝorĝo. Post kelkaj provrespondoj de la lernantoj, mi diras:

'*Ĝorĝo estas dudekjara kaj.... parolas Esperanton!*'. Kaj mi daŭrigas ripetante

- '*Ĝorĝo estas dudekjara kaj parolas Esperanton!*' (kaj aldonante) '*Mi estas deknaŭjara kaj parolas Esperanton kaj... la francan!*'.

Poste mi transdonas Ĝorĝo-n al mia maldekstra najbaro, rigardante lin kaj helpante lin diri:

- '*Ĝorĝo estas dudek-jara kaj parolas Esperanton! Sylvain estas deknaŭjara kaj parolas Esperanton kaj la francan! Kaj mi estas dekokjara kaj parolas Esperanton kaj la francan kaj....*'.

Li aŭ ŝi devas aldoni novan lingvon, kaj tiel plu ĝis la fino ('Mi ĵus naskiĝis kaj ankoraŭ nur balbutas...?').

Rimarkoj:

- se la grupo konsistas el malpli ol 20 personoj, la afero pluiras ĝis nulo, do eblas, ke kelkaj dufoje parolos. Se la grupo estas tro granda, la aĝon de Ĝorĝo elektu tiel ke ĉiu havu eblon ekparoli, aŭ kreu du grupojn paralele funkciantajn kun antaŭa mallonga provludo.
- aldonu gestojn por simboli la diversajn lingvojn (ekzemple la Franco kun sia glaso da vino, la Hispano kun la flamenko, ktp). La aliaj gelernantoj povas nevoĉe helpi per farado de la gestoj.
- la amuza afero (kaj motoro de la aktivaĵo) estas kompreneble rapide sukcesi ripeti la tutan serion
- aldonu ekzotikajn aŭ ne ekzistantajn lingvojn (la birdan?)
- se la grupo estas jam pli forta (aŭ kelkaj gelernantoj), aldonigu adverbojn: 'Ĝorĝo estas dudekjara kaj parolas senerare Esperanton! Sylvain estas deknaŭjara kaj parolas senerare Esperanton kaj mirinde la francan! Kaj mi estas dekokjara kaj parolas senerare Esperanton kaj mirinde la francan kaj denaske....'

Kunĝuon!